



ORIENTA STELO

Oktoebro 2016



Orienta Esperantista Federacio
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation
Originally founded in April 1932

Komitato - Kontaktdetaloj

Roy Simmons
Barrie Murphy
Mark Drake
Roy Threadgold

Sekretario 01473461346
Kasisto 01702472193
Komitatano 02085188094
Bultenisto 01371850481

rokeby@globalnet.co.uk
celiaandbarrie@tiscali.co.uk
marko.drejko@gmail.com
roy@boydellsdairy.co.uk

Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue kun koloraj bildoj, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.

Somera renkontiĝo

Dimanĉon la 4an de septembro renkontiĝis en la stacidomo kaj fervoja muzeo Chappel kaj Wakes Colne, ses el niaj federacianoj. Bedaŭrinde Alan Hughes, kiu frue alvenis, devis foriri frue, sed la cetero restis la tutan tagon rigardante la multajn erojn, kiuj entute estas la muzeo, tra kiu iras la trajno inter Marks Tey kaj Sudbury.



En la foto, ĉiuj ludas per la teniloj, kiuj antaŭe funkciigis la semaforojn, ktp., dum Arturo, kiu estas sperta pri tiaj aferoj, klarigas.

La muzeo estas granda afero, kaj kovras kelkajn hektarojn, do, kompreneble, la grupo elspezis multe da tempo promenante de unu ero al la alia. Pro tio ne estas surprizo, ke ĉiuj

finfine troviĝis en la ristoracia vagono trinkante teon kaj kafon, kaj manĝante kukojn kaj sandviĉojn. Tamen, ŝajnas ke Roy T incitas pugnobatalon!



Dumla tago la suno brilis, kaj ĉiuj ĝuis la tagon. La libroservo estas bonega, kaj estas multe da libroj, kiujn oni rajtas aĉeti. En unu el la vagonoj ankaŭ estas amason da brokantaj libroj pri diversaj aspektoj de la fervoja mondo, kaj oni rajtas havi ilin kontraŭ donaco. Eble la sola problemo por kelkaj estis la fakto, ke homoj en la muzeo preparadis por bier-festivalo, sed ne por la tago ni estis tie.

Ni certe rekomendas la viziton, kaj pro la fakto, ke ĝi estas vera stacidomo, oni rajtas alveni per trajno, sur la pontaron. Multaj homoj opinias, ke Orientanglio estas tute ebena, sed la pontaro tuj sude de la stacidomo Chappel kaj Wakes Colne estas la plej longa en tiu parto de la lando.

RS

Sabaton la 29an de oktobro
Aŭtuna kunveno
Friends Meeting House
Maldon
11.00 atm ĝis 5.00 ptm.

Lingvaj diskutoj, promeno, kvizo, ludoj
Gastpreleganto - Anna Löwenstein
Prelegos pri
"Faktoj kaj fantazioj pri la antikvaj keltoj"
Tagmono £5 (inkluzivas manĝojn)

Saturday, 29th October
Autumn Meeting
Friends Meeting Hose
Maldon
1100 – 1700

Language discussions, walk, quiz, games.
Guest Speaker – Anna Löwenstein
Who will speak about
Facts and Fantasies about the Ancient Celts
Day money £5 includes meals